

enhavo

Orlando Raola González
Venke, bonpaŝe kaj malkrokodile 3

havano vokas

Novo frekvenctabelo 6

tra la lando

Maritza Gutiérrez González
Diversloke 7

Landa gazetaro 7

pri movado senhalta...

Alexis Otero Castellón
Lasu la lingvon aŭdiĝi 8

Maritza Gutiérrez González
Strategioj kaj realo: informa fako 9

kultura panoramo

Orlando Raola González
La lasta deklaro de la esperantistoj 10

Kolokvo 11

tra la lando (II)

Alexis Otero Castellón
Ni semas kaj semas 14

la radetoj

Maritza Gutiérrez González
Kun vojaĝema samlandano 15

havano, la 31an de decembro 1992 • n roj 1 - 4/1992 • aperas kvarfoje jare, sed ĉi -jare nur unufoje! • eldonas kuba esperanto-asocio, pf. 2018, 10200 havano, kubo. telefono 40-4484 • retroŝta adreso: keacu%ceniai.@igc.org • ĉefredaktoro orlando raola gonzález • kunlaborantoj maritza gutierrez, alexis otero • pliaj kunlaborantoj serĉataj • prezo de unu ekzemplero enlande 0.50 cup, eksterlande 2.00 nlg aŭ 2 irk, pagendaj al la konto keax-u en uea • subskribitaj artikoloj esprimas la opiniojn de liaj aŭtoroj • ĉiuj rajtoj rezervitaj • reproduktaĵo perme-sata, bonvolu indiki la fonton kaj sendi du ekzemplerojn al la rekdakcio



**Kuba
Esperanto-Asocio
Antaŭen!**

estimataj,

ni ne plenumis la promesojn de antaŭa antaŭparolo, ĉar *Avanco* ne aperis en marto, nek aperis aparte kvar kajeroj 16-paaj. Pluraj kialoj kontribuis al tiu katastrofeto, sed finfine, rando de la jarfino, ĉiuj fortoj kuniĝis kaj okazis la miraklo! Legu ĝin atenteme, trovu en ĝi ideojn kaj instigojn. Aparte frapos vin pluraj alvokoj al senhezita kaj konstanta uzo de la lingvo. Tiu ĉi estas la unusola numero por la tuta 1992 sed espereble ĝi iel ŝtopos la truon okazigitan de dek du monata atendado. Fartu bone kaj ĝis venonta numero, bondeziras al vi via redaktoro,

Stark

Venke, bonpaŝe kaj malkrokodile!

Orlando Raola González

Foje malfacilas objektivi. Antaŭ mirvekaj faroj de la homoj, se oni devas ilin prikomenti, homlingve kaj hommense, ne eblas objektivi. Sed tio kompreneble ne detenu onin de esprimado, ĉar cetere, iel la posteuloj devos scii pri la hodiaŭa, kaj prefere ili havu informojn nuancigitajn de niaj propraj sentoj ol neniun informon.

Se iu paŭtis leginte la titolon, esperoble la filozofieca cerbumaĵo unuaparagrafa helpis lin aŭ ŝin kompreni ke jes!, ne ni spitis la ventojn, kaj malgraŭ la tre malfacilaj tempoj, ni sukcesis: ĝojvenke ni povas aserti, ke la flamo ne estingiĝis, ĝi plue lumas!

Sen ajna celo polemiki, ni esprimas ĉion ĉi. Temas pri monte granda vero. La flamo estas ni, kaj ni povas nur inviti niajn akuzantojn, por ke ili sobre taksu la realon surloke. La legantaro de *Avanco* scias, ke en grava Esperanta revuo ekstermovada, iu de ĉiuj konata anonimulo, galverŝe reagis al la ĉefartikolo de nia antaŭa numero. Ĉar aliaj aliloke kaj ĝustatempe inde respondis al tioma impertinento, nur restas danki al tiu redaktoro la diskonigon de parto de niaj ideoj (kion li faris per abundaj citaĵoj), kaj diri ke nia modesta periodaĵo fariĝis tiel mondfama pro lia artikolaĉo, ke abonpetoj surplusis nin centope: vere neatendita helpo al la kuba Esperanto-movado, fare de tia fiintenculo.

Kaj nun al niaj aferoj. Rapida superrigardo en 1992 montras multajn pintojn

kaj ankaŭ disajn valojn. Inter la pintoj elstaras la brila komitatkunsido, okazinta fine de januaro en Bajamo, kie la plej-supera instanco de KEA fiksas novajn prioritatojn por jara laborperiodo. Ĉar dokumento enhavanta la tutan vortumon de la taskaro vaste cirkuladis inter niaj vicoj, ĉi tie nur ni resumos iom supraĵe la efektivigon kaj rezultojn.

La novaj prioritatoj

Unue, la daŭra strebo porti la Internacian Lingvon al ĉiuj teritorioj de la lando, eĉ al la plej foraj, eĉ al tiuj kie ĝis nun ne ekzistas la movado. Por entrepreni tiun taskon, ni ĉerpas energion el la rimarkinda kresko okazinta en Pinar del Río. Baldaŭ ĉiu provinco kaj la speciala municipo estos ankaŭ nia hejmo. Tio postulas multon el ni, des pli sub la jam konataj malfavoraj kondiĉoj altrudataj de la Speciala Periodo. Sed la malbona ekonomia stato devigis nin trovi manieron kiu jam anoncas sin kiel atuton por la planata disvastigo: ni nun kalkulas je tutlande plene funkcianta perkorespondanta kurso. Ĝi obligas al ĉiu kubano, ie ajn tra la lando, lerni Esperanton. Eventuale ĝi fariĝos eksportebla, kaj obligos al aliaj hispanlingvanoj tra la mondo la lernadon. Mi alvokas ĉiujn apogi la efektivigon de tiu

ĉi iniciato, kiun rekte prizorgas la Nacia Estraro en Havano.

Alia, ne malpli grava agado, estas la organiza flanko. La nove aprobita statuto, ĝia ĝenerala regularo kaj la akurata plenumo de la kalendaro por ilia enkonduko efikas vere organizige: novaj strukturoj, pli funkcipovaj, kaj pli rekta partopreno de la asocianaro estas la tujaj rezultoj de la enkonduko. *Avanco* salutas la nove elektitajn estrarojn kaj komitatanojn, deziras al ili ĉiujn sukcesojn en la laboro, kaj profitas la okazon memorigi al ĉiuj, ke la paĝoj de nia revuo estu ofta kaj nepra tribuno por agiti, instigi, admoni aŭ laŭdi, laŭbezone.

La eksteraj rilatoj de la Asocio (ambaŭ kun la eksterlanda Esperantokomunumo kaj kun la enlandaj necesperantaj organizaĵoj) estis ĉiama prioritato en nia laboro, ankaŭ dum la nuna jaro. La internacia foiro de lingvoj kaj kulturoj EXPOLINGUA'92, okazinta aprile, definitive malfermis al la kuba esperantistaro la randojn de profesiaj lingvistoj kaj lingvoinstruistoj, estigis fruktodonajn laborrilatojn kaj jam estas survoje la preparlaboroj por partopreni similspican eventon venontjare.

Spertinte la proksimecon de karaj geamikoj

La planita konferenco Esperanto'92 estis unue prokrastita ĝis la jarfino; fine ĝi iel realiĝis, ne kiel ni antaŭvidis, sed alimaniere, ĉar eksterlandaj delegitoj ne alflugis amase nian landon. Tamen ni havis gravajn gastojn ĉe la jarfino (kvin entute), inter kiuj la elstaraj Detlev kaj Wera Blanke, kiuj dum preskaŭ tri feriaj semajnoj de intensa laboro prelegis antaŭ lingvistoj en la du ĉefaj urboj nialandaj kaj okazigis plurtagan seminarion en la sidejo de KEA por la asociaj aktivuloj, montrante ke ja eblas, ke kres-

kas eĉ la kvanto de tiaj esperantistoj, pretaj fordoni parton de si por pluivivigo de Esperanto n(tr)iamonde. Ĉu temis pri surogato de nia konferenco? Eble, sed utila, sukcesa kaj homfratiga evento: tute valida.

Laŭ niaj iamaj planoj, KEA devis kongresi ĉiujare, sed la situacio en la lando praktike malpermesis tion, kaj la komitato do decidis aliri novan formon por tutlanda partopreno: renkontiĝoj inter la lokaj filioj de najbaraj (kaj ne tro najbaraj) provincoj. Tiel ni sukcesos teni viglajn kontaktojn, kompari la atingojn kaj mankojn de nia laboro, kaj sproni ĉiujn al pli serioza agado.

Ne nur giganti ni celas

Ni volas rimarkigi la gravecon zorgi kiel eble plej detale flankon de tiuj renkontiĝoj, kie evidentiĝas unu el la mallumaj «valoj» supre aluditaj: en ilia kadro devas roli unuavice se ne ekskluzive nia kunfandigilo: Esperanto. Estas ne neebla vero, ke ĉiam en nia movado svarmis komencantoj (same okazas ĉie tra la mondo). Tamen tio neniel povas signifi, ke ni cedu al la emonacilingve interkomunikadi dum niaj regionaj kontaktoj, eĉ kiam ne partoprenas eksterlandanoj. Ĉar tiukaze, ni perdus la esencan sencon de niaj klopodoj: per praktiko teni nian komunikilon akra kaj bone funkcipova. Atentu bone, ke mi ne instigas al limigo de partopreno nur por tiuj kiuj jam iom regas Esperanton. Eĉ male. Ni venigu al niaj aranĝoj ĉiujn interesitojn. Sed dum la malmultaj horoj kiam ni Esperantistoj restas kune, aŭdiĝu nur la Lingvo Internacia. Estu nia asocio giganto, sed ne nur giganti ni celas. Ja ni celas esti granda kaj amikeca rondo, sed pere de lingvo bela kaj unika. Ni estu ĉiam pretaj klarigi al ĉiuj deman-

dantoj, ke la kultura movado nialanda provizas ĉiaspecajn ŝancojn por kiuj volas arte amatori en la hispana lingvo. Do, kiuj decidis resti ĉe ni, tiuj nepre uzu la lingvon Esperanto.

Ni finu la instigon al pli konsekvenca esperantismo kadre de niaj grandaj aranĝoj per citaĵo historia. Tiel parolis Ivo Lapenna, plej elstara retoro ĉi-jarcenta, okaze de la 46a UK en Britio, 1961: «*Kelkaj Esperanto-organizaĵoj, inkluzive plurajn lokajn grupojn, tro ofte uzas en la kunvenoj aŭ kunsidoj la nacian lingvon. Kutime oni tion faras aŭ pretekstas tiel fari "pro la komencantoj". Efektive, ne nur pro la bonaj kondiĉoj de la lingvo, sed precize pro la komencantoj, oni devus ĉiam, en ĉiuj niaj organizaĵoj, praktiki nur la Internacian Lingvon [...] Kien iros la miloj kiuj ĉiujare eklernas la Internacian Lingvon por praktiki ĝin kaj tiel perfektigi sian komencantan scion? Kie estas la lando, en kiu la Internacia Lingvo estas parolata? Ĝi ne ekzistas, sed*

ĝin povas kaj devas anstataŭigi niaj organizaĵoj, unuavice la lokaj Esperanto-societoj. En ili estu aŭdata ĉiam kaj en ĉiuj okazoj, ekde la oficialaj programoj ĝis la plej ordinaraj konversacioj, sole la Internacia Lingvo. Nur tiamaniere estos eble atingi, ke la miloj da personoj, kiuj ĉiujare komencas lerni Esperanton, transformiĝu kiel eble plej baldaŭ en bonajn uzantojn de la lingvo. Tio siavice fortigos ĉiujn niajn organizaĵojn, helpos al kreskigo de la Esperanto-literaturo, faros la kunvenojn, konferencojn kaj kongresojn pli interesaj; unuvorte, fortikigos kaj antaŭenigos la tutan Esperanto-movadon.»

Tio estas ĉio. Jen nova jaro 1993, kun novaj zorgoj kaj maltrankviloj. Finan saluton por la komitatanoj kunvenontaj en Santiago de Kubo fine de januaro kaj por la elektota Nacia Estraro de Kuba Esperanto-Asocio. Espereble kaj certe, la venontaj numeroj de *Avanco* povos konstati ke: tamen (spite ĉion!) la afero progresas!

Al Kubo tuttempe!

Eble multaj legantoj de *Avanco* memoras pri iama slogano: «Al Kubo kongrese...» diskonigita en 1990 fare de revuo *Esperanto*. Ĉi foje ne temas pri kongreso, sed pri la ebleco gastigi en la nova sidejo de Kuba Esperanto-Asocio en urbo Havano. Ĝi estas belega, duetaĝa domo, kie povas loĝi ĝis 12 gastoj samtempe. Tie niaj eksterlandaj geamikoj povos pasigi neforgeseblajn tagojn, en kontakto kun la lingvanaro de la Esperantista urbo ĉefurbo de Karibio kontraŭ tre malgrangranda elsepezo (10 USD tagnokte), kaj tio inkluzivas loĝigon kaj matenmanĝon. Aliaj manĝoj estas mendeblaj laŭ interkonsento.

Por niaj kubaj legantoj, estas ankaŭ ĝojiga novaĵo: se pro persona aŭ oficiala kialo vi devas vojaĝi al la ĉefurbo, vi povas kontakti la sidejon, kaj plejeble vi povos ĝui ankaŭ la komforton, kiun nun ofertas la tre diligenta stabanoj tie dungitaj, kaj ĉiuj viaj amikoj-esperaantistoj.

Adreso de la sidejo: Vista Alegre 264 e/ Juan Bruno Zayas y Luĉ Caballero, Vībora, Ciudad de La Habana, telefono 40-4484. Por poŝtaĵoj bonvolu uzi la adresojn de KEA kaj de la redakcio, sur la kolofono. Bonvenon kaj dankon!



La Esperanto-redakcio de Radio Havano Kubo sukcese travivis la jaron 1992, kiu estis vere laborplena kaj fruktodona: dum la pasinta septembro ni festis kvarjaran laborekziston. La mikrofonoj de Radio Havano klopodis kapti la plej gravajn eventojn de la Esperantomovado niainsule, kaj tiucele ni iris al Santiago de Cuba, okaze de la vizito de ges-roj. Wera kaj Detlev Blanke.

Je internacia skalo estis lanĉita enketkonkurso, kunaŭspiciĉe de KEA kaj RHK, kies rezulton ni diskonigos en majo venontjare. Aliflanke ni estas tre feliĉaj ĉar daŭre venas al nia redakcio korespondantoj de kubaj esperantistoj, fidele aŭskultantaj niajn elsendojn, kaj dank'al tio ni povis dediĉi sufiĉe regule erojn de niaj programoj al la landa movado. Menciindas José Luis Montes de Oca el Santo Domingo, Maria Elena Fuentes el Holguín, Norberto Díaz Guevara el Sancti Spiritus kaj Ladislao García Acosta el Camagüey. Kun aliaj ni tenis telefonajn kontaktojn tre utilajn, kaj kompreneble, de ĉuj mondpartoj venadis amikaj leteroj, periodaĵoj, informiloj, kaj aliaj utilaj materialoj por in-

τ UTC	ν (kHz)	λ (m)	Regiono
0700-0720	6060	49.50	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1500-1530	11660	25.63	Norda, Meza, Suda Amerikoj kaj Karibio
1830-1900	15165	19.78	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
2200-2230	15165	19.78	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
2330-0000	119700	25.06	Norda, Meza, Suda Amerikoj kaj Karibio
	11660	25.73	
	9655	31.07	

forma programero pri la tutmonda Esperantomovado.

Do, la invito ĉiam samas. Aŭdu la programon kaj sciigu al ni opiniojn, sugestojn kaj kritikaĵojn. Memoru ke la ekstero scivolemas pri ni, do, ni sciigu al ĉiuj ke en Kubo la esperantistoj daŭre laboras, eĉ en plej malfacilaj cirkonstancoj. La Esperanto-redakcio de Radio Havano Kubo estas nia voĉo tra la mondo. Bonvenon!

Skribu tuj al Radio Havano Kubo, Esperanto-redakcio, poŝtako 6240, Havano, Kubo.

Diversloke

Maritza Gutierrez

Dum tiu ĉi jaro la esperantistoj nialande tute ne ripozis, sed male plu agadis en diversaj gradoj kaj agadkampoj, jen movade jen ekstermovade, kio kompreneble multe utilas al ĉies aktivula laboro. Ni nepre volas paroli pri kelkaj tiaj aranĝoj, sed ne pri ĉio ni ricevis informojn. Nu, al ĉiuj ni petas daŭre sendi informojn al la redakcio de *Avanco*, kiu multe dankos pro la kontribuo. Jen kelkaj aranĝoj plenumitaj:

—Esperanto-festivalo en Florida 27a-29a de marto kun esperantistoj el Santo Domingo

—Sabataj festoj en la sidejo de KEA en Havano, kie pli kaj pli la anaro unuiĝas kaj ĝuas agrablan etoson esperantisman. Menciindas la speciala sabata renkontiĝo omaĝe al la dektrijara ekzisto de KEA, kio okazis la 16an de junio ĉi jare.

—Unua Tutlanda Konferenco pri Esperanto okazinta de la 23a ĝis la 26a

de junio en la esperantista domo de Havano.

—Porinfana festo sabata en la sidejo havana okaze de la infana tago kun partopreno de esperantistaj idoj; kion multe ĝuis la infanoj kaj la gepatroj.

—Laŭlonge de nia lando finiĝis diversaj kursoj kaj okazis kursfinaj aranĝoj jam tradiciaj, kie la finlernintoj ricevas diplomojn.

—En Bayamo efektiviĝis omaĝa renkontiĝo okaze de la filia fondo kaj kultura programo kie la konata duopo Imagtro prezentis repertuaron en Esperanto.

—De la kvara ĝis la kvina de julio okazis en Gibara, provinco Holguin, la 3a provinca festivalo de Esperanto.

Rilate al la diversaj aranĝoj en la havana sidejo menciindas la streboj faritaj de la havanurba estraro por plibonigi siajn servojn al la membroj, kio pli efike montriĝis dum la lastaj aranĝoj sukcese plenumitaj.

Landa gazetaro: Ni, vi, la aliaj...ĉiuj!

Jen la nomo de la bulteno de la Esperanto-klubo «Pli da lum» de Santiago de las Vegas en Havano. Temas pri salutinda laboro plenumata de la klubo sub la redaktora gvido de Gustavo Morales, konata jam kiel administranto de la sidejo de KEA. La dua

numero de la bulteno prezentas decan bildon pri la agado de tiu klubo per sufiĉe bona lingva stilo kaj varia enhavo. Ne ĉio esas laŭdo rilate la informilon, sed kiel Zamenhof mem diris: «Ĉio plibonigebla estos plibonigata».

Lasu la lingvon aŭdiĝi

Alexis Otero Castellón

Pli ol unu fojon oni atentigas bonan Esperanto-parolanton al utiligo de la lingvo. Tamen, konstateblas ke malgraŭ tio, krokodiloj superŝutas niajn aranĝojn kaj kelkajn kunsidojn. Per ĉi supra vortumo mi celas vundi nenium, male mi deziras rimarkigi la bezonon paroli, eluzi nian bele esprimovan Esperanton.

La sinteno utiligi lingvon fremdan en la kadro de aranĝoj, ekzemple, estus tolerinda al ĵus komenciĝinta lernanto sed al ajna estrarano ĝi efikus tre malbone.

La nunaj (ĉu por ĉiam?) cirkonstancoj firmigas mankon de okupiga aŭ profesia profilo —ĉarma allogo por ekstudi kion ajn— rilate Esperanton. Tio estas trafa argumento per kies efiko oni sukcesas konvinki homon (almenaŭ ĉe ni) por ke tiu ne entreprenu studadon de la Internacia Lingvo. Poste, se la ebla lernonto stoike eltenas, malaŭskultas la opajn kontraŭargumentojn kaj kuraĝe engaĝiĝas en nian ideon, tre decus ke li aŭ ŝi aŭdu la lingvon ĉie kaj konstatu ke efektive ĝi funkcias komunikece por ĉiu ajn paroltemo.

Ni ne luksu forgesi la fakton, ke nuntempe la homoj batalegas por vivteni sin kaj realisme, ne ĉiuj pretas aliri fakon kies lernadon elbligas nenian profiton.

Aranĝojn kelkaj ĉeestas drinkcele sed la ceteraj —pli ol duono, miaopinie—, iras ĉar ili ŝatas aŭskulti kantadon aŭ paroladon esperantan kaj mem pretas ion diri por iel aliel kontribui. Aliflanke pluraj homoj kaŝas sin malantaŭ fantoma oniflusto pri manko de propagan-

do, kio ĉie embarasigas la tiufakajn estraranojn, kiam per simpla konversacio jen telefona jen enbusa jen vicostara jen surtrata, pli facile oni povas vekii aliesan interesiĝon. Kompreneble uzante la lingvon: jen taŭga okazo ataki per bela propagando varbiga.

Ne ĉiam —mi ne diru neniam— oni informas aŭ propagandas per radio aŭ televidprogramo aŭ per eta anonco sukcese ŝovita en ĵurnalon; se pli kaj plu la lingvo estas publike uzata, kaj kiam oni demandas nin pri kiu lingvo temas ni ne troigas, t.e., se fine la lingvo aŭdiĝas, tiam ni povas ja asertri ke ni kaj propagandas, kaj sciigas kaj utiligas la lingvon.

Ĉu vi havas malfacilaĵojn por paroli Esperanton? Se ne, uzu ĝin svinge, kaj spronu la ceterajn al tio, se jes, sentime eĉ senhezite intencu, klopodu, strebu, alcelu —ĉu mankas alia verbo tiusenca?— alparoli ĉiujn Esperante, kuraĝigu vin mem, tio psike helpas. Dume, tiuj respondintaj ne, retroiru la tempojn kiam dirinte «si» kiel respondon al ĉu-demando oni ricevis mokon tian: «Kion signifas tio, ĉu vi respondas refleksive?»

Mi celas ja, treni ĉies atentojn voĉdoni kaj agadi pore al restarigo de KONTRAŬKROKODILA KRUC-MILITO, almenaŭ en esperantistejoj, oni taksas «ĉarme normala» la sintenon aĉe babili nacilingve. Ne temas pri paraŝute enkonduki emon paroli fuŝe aŭ senpeke, sed precipe kaj principe tion ke «ni lasu la lingvon aŭdiĝi...»

Strategio kaj realoj: informa fako

Maritza Gutiérrez González

Ĉijare, kadre de la Komitkunsido, ni ĉiuj kontente akceptis labor-strategion por la jaroj 92-93, sekvante la linion de simila antaŭa dokumento pasintjara.

El tiu dokumento ĉe la informa para-grafo mi prenis jenan fragmenton: «Informado ĉiam pli kaj pli fariĝas agado, kiun ne kiu ajn povas entrepreni.»

Cetere mi plenkonsentas tiun aserton, sed mi tre ŝatus iom pripensigi vin pri tiu afero. Kio estas informi? Ĉu propagandi funkcias ankoraŭ ĉe nia movado? Ni pensu nur sekunde pri pluraj sindonaj esperantistoj tra nia lando, kiu tutan jaron post jaro entreprenas aktivan laboron favore al diskonigo pri Esperanto; ĉu ili tion faras per minimumaj rimedoj rilate fakan aŭ duon fakanscion? Bedaŭrinde ni ĉiuj sentas niajn mankojn sur tiu kampo. Ĝuste tial mi celas interesigi vin pri tiu aspekto de nia poresperanta laboro. Jen kelkaj simplaj difinoj:

Informi: doni sciigojn aŭ klarigojn al iu pri io de li ankoraŭ ne konata (PIV, p. 427).

Propagandi: klopodadi disvastigi ideon (PIV, p. 876)

Multaj personoj povas prave konsideri la terminon *propagandi* tute taŭga. Estas vero, ke ekde la ekesto de Esperanto, multaj homoj tutmonde klopodas gajni adeptojn al la ideo, sed kiel atingi seriozajn adeptojn kaj funde interesigi ilin pri nia propono?

Unue, ni komprenu ke *propagando* entenas altrudan nuancon tre ofte ne ŝatatan de homoj, dum *informo* estas pli subtila kaj vekas intereson; do psikologie

ne ekkomencu nian varbo-laboron per pli ne altrudaj rimedoj; tiusence ni bone skizos niajn celojn.

Mi aparte rimarkigas, ke ambaŭ terminoj estas ligitaj al aliaj kiel *varbi* kaj *argumenti*. Do, estas necese — kaj pri tio la Laborstrategio bone starigas diferencojn — konscii pri la valideco de la termino *informi* kun apartaj trajtoj ĉu temas pri ĝenerala publiko aŭ la anaro. Tiucele oni antaŭvidas ĉe la landa asocio estiĝantan «Informa Fako» postulata de la nuntempo; kio cetere, pli prestiĝigos la Asocion kaj ties membraron. Tamen, ni ne povas plenrifuzi la terminon *propagandi* ĉar nekontesteble ekzistas taskoj nepre entreprenindaj ekde propaganda profilo. Pri ĉio ĉi tro longe oni povus paroli, sed unue ni konsciu pri la rolo de tiu laboro kun lerteco kaj zorgoj.

Kvankam la strategio kondukas nin en bonan direkton, ni ne povas forgesi, ke ralia ankoraŭ tre foras, ĉefe en kelkaj regionoj de nia insulo, kie viglaj entuziasmoj ĉiutage alfrontas kaj ŝercajn kaj seriozajn argumentoj kontraŭajn. Ĉu multaj el niaj aktivuloj starigos tiutemajn demandojn? Ĉu nia organo *Avanco* estos bona tribunano por strebi al tiu celo? Tion nur vi povas aserti aŭ ne. Memoru, ke la kvalito de nia movado multe dependos de la argumentoj uzitaj en niaj varbo-kampanjoj, lernejoj kaj aliaj publikaj aranĝoj. Antaŭ ol komenci tiujn, ni bone difinu la celon kaj la publikon ricevontan niajn diraĵojn. Almenaŭ tiel ni povos iom dece ekpaŝi. Bonsorton!

Post iom longa foresto, jen denove KP sur la paĝoj de Avanco . Nia klopodo havigi al vi interesajn temojn nur ricevos ĝustan rekompencan se vi iel reagis al nia kunmetaĵo, jen per sugesto pri traktinda temo aŭ per komentoj rilate al la traktitajn. Ni pretas publikigi (preskaŭ) ĉiaspecajn sendaĵojn. Bonvolu, ne estu maldiligenta, ja tio ne decas al serioza kaj engaĝita esperantisto. Ĉi foje ni ofertas temojn rilatajn al la strategio kaj sociokultura identeco de nia tutmonda movado. Ĝuu ilin.

la redaktoro

La lasta deklaro de la esperantistoj

Orlando Raola González

En la pli ol centjara historio de la lingvo Esperanto kaj ĝia rilata movado, multaj pluraj dokumentoj, deklaroj, proklamoj, manifestoj ke, helpe de kiuj la fakuloj povas rekonstrui pli malpli la diversajn etapojn kaj malsimilajn ideofluojn apartenantaj al la E-movado.

La unua el tiuj estis la Bulonja De-

klaracio, kadre de la Unua Universala Kongreso en 1905, kies teksto indas je parkerigo fare de ĉiuj lingvouzantoj kaj lingvoamantoj. La pola sociologo J. Leyk p. ave nomas ĝin «la ideologia kateĥismo de la movado». Ĝi tekstas jene:

Deklaracio pri Esperantismo

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la Internacia Kongreso Esperantista en Boulogne sur Mer, trovis necesa, laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto, doni la sekvantajn klarigon:

1. La Esperantismo estas penado disvasti en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu «ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn nacian», donus al la homoj de malsamaj

nacioj la eblon komprenigadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke Lingvo Internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj jarcentoj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiufanke elprovita, perfekte vivipova kaj en

ĉiuj rilatoj plej tatinga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de Lingvo Internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam delonge ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas «nenies propraĵo», nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras kaj uzadi la lingvon por ĉiaj cblaj celoj; kiel spirita mastro de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas nenian personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj

verkoj de ĉiu alia alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu deviga.

La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verkoj, li neniam povas pravigi sin per la vortoj «tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto». Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda sed ne deviga.

Alia Universala Kongreso en Munkeno 1951, celis icla kompletigon de la bulonja dokumento, laŭ la rezultoj de la tiamaj esploroj kaj studoj pri la psikologiaj efikoj, kiuj kaŭzas la uzado de Esperanto en la internacia praktiko.

Vere famaj kaj gravaj siatempe ankaŭ estis la Deklaracio de Tireso (1969) kaj la Manifesto de Raŭmo (1980). Ni invitas vin tralegi la artikolon de Stefan MacGill en la julia-aŭgusta numero de revuo *Esperanto* de 1991, paĝo 130-31, kaj la plurajn reagon aperigitajn poste en la sama publikigaĵo: de H. Mayer, G. Silber, P. Daŝgupto (oktobro 1991) kaj denove de MacGill en la decembra.

Pro la troa juneco de la movado en Kubo ni restis tute for de la ĉefaj evoluoj je tutmonda nivelo ĝis la mezaj okdekaj jaroj, tiel ke la nomoj Tireso kaj Raŭmo malmulte elvokas ĉi tie. Sed nun ni ne plu

estas for(ges)lando; male: ja iama kongreslando, la ĉi-tica movado, juna sed amasa, plikleriginda tamen tre vigla, tute certe havas ion por kontribui internaciskale, per transdono de propraj spertoj, elreviĝoj kaj novaj klopodoj, ĉiam alcelante la progreson de Esperanto, ajnmaniere kaj per ĉiuj disponeblaj rimedoj.

Jen kialo por ĝisfunda analizo de la lasta deklaro. Ĝi estis aprobita de la kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en la norvega urbeto Voss, somere de 1991, kies tekston ni ankaŭ aperigas, ne cele al parkerigo fare de iu ajn, sed celante instigi al studado, al profunda meditado pri la ideoj tie verŝitaj, al komparo kun la supre menciitaj tekstoj por konstati la evoluon de la ideoj kaj fine por ellaborado de propraj reagoj kaj iniciatoj.

Proklamo de Voss

Esperanto kiel funkcia lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange garavas enfazi, ke Esperanto estas jam funkcia lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj, kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiginteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demokratiigo de la komunikado.

Esperanto kaj strategio

Kerno al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unflanke, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto desupre al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas, de si mem ĝi malverŝajne kondukos al signiva kresko de la lingvo aŭ de ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desupre akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de kiu apartan gravecon havas la adekvata laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.

Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu neniu specifan lingvon --naciaj lingvoj estas respекtendaj, sendepende de grandeco.

Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ ne-parolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkontroli la mitojn kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

Esperanto --ĝia destino

La tradicia termino "fina venko" kun siaj militecaj subsignifoj transformiĝu al konstanta agado por ebligi la uzon de Esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacion komunikadon. La plukreo e aŭtonoma Esperanta kulturo estas valora, necesa, sed ne sufiĉa antaŭkondiĉo por tiu strebo; sekve konflikto inter kultur-flegemaj kaj fin-venkemaj esperantistoj estas transpontebla --ili povas trovi abundajn terenojn, kie utile kunlabori. Signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de Esperanto ne okazos:

--sole per la klopodoj de la nunaj parolantoj, kiuj havas nek la rimedojn nek la potencon tion solaj realigi;

--sen la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastigantaj, ĝis potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros kaj ekspluatos la lingvon.

Kvankam naivaj revoj pri baldaŭ "fina venko" povas naski frustruojn, certe iel forigendaj, estus tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso, ĉar tion arinte, la komunumo riskus nenion rimarki, se subite kaj neatendite maturiĝus kondiĉoj kiuj malfermus la vojon al tio.

Bonvolu, antaŭ ol daŭrigi la legadon, kontrolu ĉu vi jam pagis vian kotizon por la nuna semestro. Ni plifortigu la Asocion ankaŭ finance!

KOLOKVO

«La stato kaj estonteco de la lingvo Esperanto»

Ĉiam mi klopodis havigi al la legantoj de la rubriko KP interesajn materialojn pri okazintaj konferencoj kaj gravajn dokumentojn pri la disvolvo kaj historio de nia lingva movado. La supra artikolo bone ekzemplas pri tio. Sed ĉi foje mi plengoje asertas, ke ni ekkomencos diskuti nun ĝuste pri *okazonta* evento. Tiu ĉi antaŭtempeco donos ŝancon al la kuba esperantistaro partopreni la diskutojn, se ne fizike almenaŭ per plena konscio pri la traktotaj temoj kaj per ellaboro de referaĵoj kaj prelegoj, kiujn oni povos sendi surbendige, por ke iel ili eniru la koncernan programon.

Interesa fakto pri la kolokvo estos la centra rolo kiun plenumos ĝiakadre la Akademio de Esperanto, gravega lingva institucio, sed kies agado ricevis lastatempe sufiĉe multajn (pravajn kaj ne tro pravajn) kritikojn fare de diversajn figuroj kaj aŭtoroj nialingvaj.

La proponita dato por la okazigo estas la nordhemisfera somero de 1994 en ankoraŭ fiksota loko. Oni elektis tiun daton, interalie, por festi la centjariĝon de la apero de la Zamenhofa traduko de *Hamleto*, reĝido de *Danujo*. Laŭdire de d-ro André Albault, nuna prezidanto de la Akademio, eblas konsideri la eldonon de *Hamleto* kiel «la dato, kiam nia lingvo asertis sin kiel kultur-lingvo.»

La kolokvon akompanos plej variaj artaj prezentadoj, kie espereble reprezentigos ĉiuj sektoroj de tiu bunta ĉielarko tutmonda: la esperanta kultur-komunumo.

Jam atingis niajn manojn propono pri la aspektoj traktotaj de la kolokvo, kaj tiun liston ni transdonas al vi, por ke vi havu certan imagon pri la tuto. Sincere mi opinias, ke ĉiu vere konscia lingvano devas havi almenaŭ minimuman starpunkton rilate al pliparto de la listigitaj aspektoj. Viajn kontribuojn tiurilate

estos ĉiam bonvenaj ĉe nia redakcio. Mi certas je ili estos ja interesaj por diskutado inter ni ĉiuj. Ankaŭ eblas rekte kontakti la prezidanton de la Akademio, kaj transdoni al li viajn proponojn pri partopreno, peti ĉiaspecajn klarigojn kaj sugesti novajn temojn. Jen la adreso: d-ro A. Albault, 21 rue de Verfeil, F-31200 Toulouse, Francio.

1. Esperanto kiel lingvo:

La nuna lingvo kompare al la lingvo de la Zamenhofa tempo.

La sistemo de afiksoj kaj la 15-a Regulo de l'Fundamento.

La t.n. naturalismo en Esperanto.

La t.n. skemismo en Esperanto.

La literatura lingvo Esperanto.

La ĉefaj skoloj literaturaj de la pasinta jarcento.

La faka kaj scienca lingvo Esperanto.

La uzo de Esperanto kiel lingvo-ponto.

2. Esperanto kiel kultur-portanto:

La antikvaj kulturoj, precipe la Helena kaj Latina, tra Esperanto.

La Eŭropa kulturo kaj Esperanto.

La Azia kulturo kaj Esperanto.

La Afrika kulturo kaj Esperanto.

La teatro kaj Esperanto.

La kant-arto kaj Esperanto.

La operoj kaj Esperanto.

Esperanto kiel lingvo-ponto en literatura.

3. Esperanto kiel lernobjekto:

Ĝenerala lingvo-pedagogio aplikata al Esperanto.

La diversaj metodoj kaj iliaj aplikokampoj.

La rezultoj: malfacilaĵoj kaj sukcesoj.
La propedeŭtika valoro de Esperanto.

4. Esperanto kiel scienca objekto:

Esperantologio kaj Interlingvistiko:
celoj kaj atingoj.

Esperanto kaj ĝiaj fontlingvoj.

Esperanto inter aliaj lingvoj: ĉu ĝi estas Latinida?

Esperanto inter al planlingvoj.

Esperanto kaj la Hellena-Latina heredaĵo. Aliaj influoj.

Nia skribo en rilato kun la Latina skribo tra la mondo.

5. Esperanto en la praktiko:

Esperanto kaj informadiko.

Disvastiĝo de Esperanto tra la mondo.

Sociologio de la Esperanto-movado.

Esperanto en la diversaj sektoroj de la moderna vivo.

Esperanto en komerco.

Esperanto fronte al la politika mondo.

Esperanto en turismo.

Esperanto kiel interamika lingvo.

Esperanto ĉe la denaskaj Esperantis-
toj.

6. Esperanto en la okuloj de la aliaj:

Esperanto kaj la sciencistoj.

Esperanto kaj la registaroj.

Esperanto kaj la instruistoj.

Esperanto kaj la homoj sur la strato.

7. Esperanto kaj informado:

Rimedo de la Esperanto-informado.

Celoj de la Esperanto-informado.

Stiloj de la Esperanto-informado.

tra la lando (II)

Ni semas kaj semas

Alexis Otero

Kun partopreno de pli ol dudek delegitoj el pluraj provincoj, inter la 23a kaj la 26a de junio efektiviĝis Tutlanda Konferenco en nia nova ĉefsidejo. Ĉefaj celoj estis transdoni bazajn ĝeneralajn konojn kaj laborperspektivojn. Per la diversaj temoj «...*Simile al steloj en nokta ĉielo...*» ni fokusigis la atenton al tri buntaj agadkampoj, nome: asocia agado, lingva profilo kaj ĝenerala kulturo pri esperantismo.

La partoprenintoj havis la okazon informiĝi pri multaj sciindaĵoj kiel ĝenerala aplikado — jen faka, jen kultura — de Esperanto en scienco kaj tekniko; historio de la movado kaj pri tre gravaj konoj rilate al lingvistiko, interlingvistiko kaj esperantologio (ĉi lastaj unuajfoje serioze diskonigitaj). Aliaj sekcioj pritraktis ne malpli gravajn temojn kiaj estas instru-metodologio; organiza, psikologia kaj sociologia enkursaj vidpunktoj kaj oni speciale emfazis propagandon, informadon kaj lingvan praktikon. «...*Al ni la direkton ĝi diras...*». Prelegojn kaj disertaciojn paroladis la asociaj stabanoj je nacia nivelo kaj nia kunlaborantino Maritza Gutierrez, kiu cetere portis tien la mikrofonojn de Radio Havano.

Kompreneble, ne ĉio konsistis el prelegoj; vespere la seminariitoj neformala arigis cele al interŝanĝo de ideoj pri

daŭrigo sur paĝo 16

Kun vojaĝema samlandano

Maritza Gutiérrez González

Pro tio ke malofte ni havas okazon praktike montri kiel ni povas utiligi Esperanton, mi vidis ŝancon sciigi al vi, ke inter niaj samlandanoj estas ja bonaj uzantoj de la realaj eblecoj de la lingvo. Tiel estiĝis la ideo publikigi tiun ĉi interparoladon, kiun mi faris dekomence por la Esperanto-fako de Radio Havano Kubo. Iam en 1992 mi telefonis al Venezuelo kaj parolis kun samideano Juan Bachrich, unu el la plej elstaraj esperantistoj de tiu lando. Per li mi eksciis, ke la kubano Luis Nerey Carvajal, esperantisto de mi konata, estis en Venezuelo kaj tre bone kunlaboris kun la tieaj Esperantistoj. Fine de 1992, mi renkontis Luis Nerey en la sidejo de KEA, kie li parolis pri siaj spertoj dum unujara restado en la latinamerika lando. Poste venis la interparolado por la programo de Radio Havano Kubo.

mg: Kiam kaj kial vi fariĝis Esperantisto?

In: Mi komencis lerni la lingvon Esperanto en la jaro 1985, ĝuste antaŭ sep jaroj. Por scienca esploristo, tio estas mia fako, estas tre utile interŝanĝi spertojn por evoluo de la konoj. Mi kredas ke Esperanto povas senlime helpi al tiu disvolvo. Pro tio mi komencis ĝin

lerni kaj ekde tiu momento mi povis interŝanĝi spertojn kaj leterojn kun specialistoj en diversaj partoj de la mondo.

mg: Vi estras fakon pri specialaj materialoj en esploroj ligita al Havana Universitato. Ĝuste por faka laboro vi vojaĝis al Venezuelo. Kiel okazis la renkontiĝo kun venezuelaj esperantistoj?

In: La renkontiĝo ne okazis senintence. En 1990 mi komencis interŝanĝi ideojn kaj leterojn kun Esperantistoj el Mérida, bela urbo de Venezuelo, kaj tie estas la Universitato Los Andes. Ekde tiam komenciĝis niaj rilatoj, kaj mi esprimis al ili mian deziron studi por plibonigi mian sciencon nivelon. Kiel rezulto de tiu rilato ili invitis min iri al Venezuelo kaj ĝuste al la Universitato Los Andes. Do, mi veturis kaj ekkomencis labori kun la esperantistoj el Mérida kaj poste mi iris al Caracas kaj renkontiĝis kun amiko Bachrich. Mi prelegis kurson de Esperanto en Mérida kaj faris aliajn kunlaborojn kun ili. Do tio signifas, ke kiam mi alvenis al Venezuelo mi ne limis esti nekonato, ĉar jam antaŭ mi havis la rilatojn.

mg: Kion vi opinias pri la movado en Venezuelo?

In: Mia opinie, ĝi estas sufiĉe disvolvita, tamen ekzistas du grandaj kaŭzoj kiuj malhelpas la evoluon. Unue, ne ekzistas helpo de la ŝtato por la movado kaj la mono ne sufiĉas por publikigi librojn kaj aliajn materialojn. Due, la Esperantistoj estas tre disaj tra la lando; tio signifas, ke estas tre malfacile ariĝi kaj kunlabori. Ili devas okazigi jarkunvenon, kaj mi pensas, ke ili ne povas ariĝi por tia aktiveco. Tamen ili estas tre viglaj kaj afablaj; mi povis tre bone kunlabori kun ili kiam mi faris la kurson de Esperanto en la Universitato.

mg: Ĉu vi deziras aldoni ion por niaj legantoj?

In: Mi volas nur diri, ke Esperanto povas helpi ĉiujn; ĝi helpas nin trovi rilatojn, interŝanĝi ideojn, leterojn; kaj mi pensas ke ĝia estonteco estas tre esperiga en la klopodoj por paco kaj amikeco. Mi ankaŭ ŝatus saluti miajn geamikojn en Venezuelo kaj en Kubo. Dankon!

mg: Kore dankon al vi!

plej diversaj temoj, krom teumi, kafumi, iom koboldi krokodile ktp.

El organiza flanko, malgraŭ kelkaj prokrastoj, ĝenerale oni respektis la horaron; loĝigo kaj dommastraj servoj elstare funkciis dank'al ega kunlaboremo fare de Gustavo Morales kaj volontulo veninta el Villa Clara, Roberto Molina, kiun ni speciale gratulas. «...Ni forton pli freŝan akiras...». Unika malglata 1400 estiĝis pro manko de revenbiletoj por niaj gastoj el provincoj, malgraŭ ĉiaj avertadoj, kaj kion fine kaj plej bedaŭre mi ne sukcesis solvi. «...Sed nin ne timigas la noktaj fantomoj...», ĉar la homoj konsideris la Konferencon partopreninda, celtrafa, do sukcesa. Aliaj opiniis, ke tian renkontiĝon oni bezonis de antaŭ longe kaj ke ni esploru la eblon okazigi ĝin pli ol unu fojon en la jaro «...Ni semu kaj semu konstante...». Persone kaj aldone mi pravigas ilin kaj mi firmigas la fakton, ke Tutlanda Konferenco konsistigas vojon ireblan por la ĉiam oportuna kaj sugestoplena opinia, labora kaj sperta interŝanĝoj. Krome, mi deziras rimarkigi tion, ke por vere rikolti sukceson, la konoj devas transsalti la cerbon kaj la gorgon de la partoprenintoj kaj la surpaperaj informoj forlasi tirkestojn tiel ke «...Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante... Ni iru la vojon celitan...».